# *Kubo partoprenas kunvenon de ministroj pri laboro de la MNOAL*



Havano, maj 30 (RHK) La estrino de la Kuba Ministerio pri Laboro kaj Socia Sekureco (MTSS), Marta Elena Feitó,   asertis ?i-lunde, ke estas esence konservi la unuecon de la Nealiancita Movado (MNOAL) en diverseco, por alfronti tutmondajn defiojn.

Dum sia parolado, virtuale, en la kunveno de la laborministroj de tiu bloko okazinta kadre de la 110-a Internacia Labora Konferenco, ?i emfazis, ke nia lando estas plene enga?ita al siaj fondaj celoj, en la defendo de la plurflankismo kaj la anta?enigo de dialogo kaj kunlaboro.

La evento, okazanta de la 27-a de majo ?is la 11-a de junio, konsistigas la plej altan decidan organon de la Internacia Organizo pri Laboro (ILO).

Preska? 6 000 delegitoj, reprezentantoj de registaroj, laboristoj kaj dungantoj el la 187 membro?tatoj de la Organizo kunvenas tie kaj diskutas temojn de la labormondo kiel sekureco kaj sano en la laboro, lernado,

same kiel la ekonomio socia kaj subtena.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/289288-kubo-partoprenas-kunvenon-de-ministroj-pri-laboro-de-la-mnoal

**Radio Habana Cuba**